

ESPERANTO

KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Aperos monate sub la aŭspicio de la
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :

D-ro Andreo ALBAULT
11, rue des Feuillants
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :

H. MICARD, Emerita Instruisto
Epineux - le - Séguin (Mayenne)
Francio

N° 5

MAJO

1957

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.
Post-ĉek-konto : 1438-67 Nantes ;
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.



Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.

I.L.E.I.

Funkciuloj por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse*, Francio.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham*, 30, Anglio.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

Membro-Asocioj :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio)

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry* (Nord).

Kasisto : S-ro E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M-et-L.).

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro A.J. HICKS el Parkstone.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden*.

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de S.I.E.L. : Marinko GIVOJE, Poŝfako 275, *Ljubljana*.

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremen* 8, Waller Heerstrasse 134.

AŭSTRALIA ESPERANTO-SOCIETO DE INSTRUISTOJ.

Prezidantino : D-ro SUMMERS.

Sekretariino : Gertrude POLLARD.

« GRAJNOJ EN VENTO », la *Tutmondaj Interlernejaj Rondo* Marcel ERBET, TA, rue des Pins, 66, *Bienne-Biel* 7, Svislando.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubeble ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ pere!

Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

*
**

Traduko kaj Publikigo, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia loĝloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 pruvekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoro).

ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Redaktejo : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

Administrado (abonoj, ktp.) : E. BENOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M-et-L.), Francio.

Eldonejo : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

Kongreso de G.E.E.

17-an de Aprilo 1957 en Grésillon

RAPPORTO PRI I. P. R.

La franca edukista Esperanto-asocio « G.E.E. » kongresis la 17-an de Aprilo 1957 en la Esperantista Kulturdomo (Kastelo Grésillon apud Baugé, M-et-L.). Ĉar la redaktado devas esti finita jam la 20-an de la antaŭa monato, la redaktejo ricevis ĝis nun nenian eĥon de tiu manifestiĝo. Ni ĉi-sube publikigas la raporton de via redaktoro. Tiu raporto estis prezentita en la kongreso.

La franca edukista Esperanto-asocio (G.E.E.) aperigas du eldonaĵojn per po 10 kalendaroj jare : unu internacia kaj unu nacia. La internacia nomiĝas « Esperanto kaj Kulturo, Internacia Pedagogia Revuo » ; en mallongigo : I.P.R. Ĝi estis kreita por revivigi la antaŭmilitan I.P.R., kiu nun tre mankis al la movado generale. Sed pro administradaj kaj legaj konsideroj ni konservis en ĝia titolo la tradukon de la nomo de la franca eldono. Ĝi aperas sub aparta kovrilo, nun oranĝa. La redaktoro estas la subskribinto.

La franca eldono nomiĝas « Esperanto et Culture » (mallongige : E. & C.). Ĝi aperas sub nun roza kovrilo kaj entenas ok paĝojn franclingvajn aparte numeritajn. Krome en ĝia mezo, oni trovas kunagrafitajn la dek-du paĝojn de I.P.R. sen iu ajn ŝanĝo : mankas nur ties kovrilo. La redaktoro de « E. & C. », t.e. de la franca parto en la nun roza eldono estas samtempe la zorganto de la tuta eldono : nia amiko S-no MICARD.

Kiel redaktoro de I.P.R. mi devas paroli pri miaj kontaktoj kun la aŭtoroj de la artikoloj kaj ankaŭ kun la legantoj. Mi dediĉas apartan atenton al la enketo pri la estonto de I.P.R. kiu elvokis sufiĉan intereson : tiu parto estas nin pli longe, se ne preskaŭ esklude.

Miaj rilatoj kun la aŭtoroj estis ĉiam tre koraj kaj afablaj ; kelkfoje venis ioman malbonhumoron, tre komprenebla pro ne apero de artikolo, sed oni komprenu, ke nia paĝonombro estas limigita je dek-du kaj ke G.E.E. decidis, ke nur parto estus pri pedagogio, almenaŭ provizore. Sed la nombro de artikoloj, kiujn mi efektive havas en mia ŝranko certe ebligis ĉiumonate aperigi pli ol dek-du paĝoj da bonaj kaj interesaj artikoloj ; se estus tiel, la provizo certe ne elĉerpiĝus, ĉar mi trovis grandan, kaj entuziasman kunlaboremon : ĉiuj sentas la gravecon de sia partopreno. Bedaŭrinde pro la limigita spaco mi devas elekti

tro ofte la artikolojn laŭ akcesoraj konsideroj, kiel la eblecoj de enpaĝigo.

Mia laboro resumigas jene : instigo al verkado, korespondado, korekto de la manuskriptoj kaj presprovaĵoj, elekto de la enhavo de ĉiu numero. Mia ambicio estus aperigi numerojn centritajn ĉirkaŭ iu temo aŭ ankaŭ serion de artikoloj de diversaj aŭtoroj pri sama temo. Alivorte plani por la estonto : tion mi certe atingos kun la helpo de miaj kunlaborantoj. Sed aliflanke oni asertas al mi ke la revuo estas tro serioza kaj enhave kaj forme. En klara lingvo tio signifas : kaj koncerne la temojn traktitajn kaj koncerne la uzatan lingvon ! Mi ne volas kredi tion, ĉar tio signifus ke la legantoj ŝatas legi pri pedagogio maksimume nur en la nacia lingvo kaj ankaŭ ke ili kapablas legi en Esperanto nur tekstojn por infanoj : tio signifus ke ni opinias la legantojn senvaloruloj. Mi ne volas kredi, sed tiaj asertoj tamen bremsas mian agemon.

Mi ne estas profesia pedagogo, mi estas nur okulkuracisto ! Mi tamen povis surprizi la postenon, ĉar finfine ĝi estas ĉefe kaj lingva kaj homa, precipe en la nunaj cirkonstancoj : parenteze, al tiu persona punkto mi ŝuldas eĉ ankoraŭ pli varman amikecon de kelkaj el la kunlaborantoj. Fakte, la kunlaborantaro verkas la revuon, ne mi : mi nur kunligas. La kunlaborantoj ricevu ĉi-tie mian varman dankon, Mi petas ilin ankoraŭ pli forte kunhelpi al la konstanta kreado de I.P.R.

Koncerne miajn rilatojn kun la legantoj, mi ĉi-foje limigos min al la enketo pri la estonto de I.P.R. Pri tiu temo mi jam aperigis eltiraĵojn de kvin leteroj (Vidu I.P.R., 1956, p. 109 ; 1957, p. 13-14). Krome S-no MICARD enketis pri la enhavo de E. & C. kaj aperigis franclingve la opiniojn de tri legantoj. Mi nun prezentas eltiraĵojn de 10 novaj korespondaĵoj el kiuj unu estis erare sendita al S-no Micard. Mi prezentas ilin simple laŭ ordo de ricevo :

1. — 18 Feb. 57 (J.L.G., Francio)...

I.P.R. nepre devas esti PEDAGOGIA, kaj nur tio. Ĉar ni deziras, ke ĝi restu internacia, ĝi devas enteni pedagogiajn informojn el la tuta mondo. Tion ĝi devas celi. Kion deziras la legantoj? Certe ili estas interesataj de la diversaj instru-kaj eduk-manieroj laŭ la landoj. Ne timu por la komencantoj! Ili faros, kiel vi kaj mi mem faris: se ili vere VOLAS kompreni la enhavon de la artikoloj, ili rapide kaj fervore lernos la lingvon Esperanton ĝisfunde, kaj por tio ili ne uzos la lecionojn de I.P.R., sed aliajn kursojn (tre facile troveblajn) el sia lando. Ni lasu la Esperantolecionojn en la franca parto de « E. & C. ». Tiel estos pli bone.

2. — 18 Feb. 57 (E.E.Y., Francio). Laŭ mia opinio, I.P.R., bedaŭre, nepre devas enhavi lecionojn kun specialaj klarigoj por pedagogoj. Mi diras tion, ĉar ŝajne ne pli ol 50 % de la legantoj de I.P.R. estas kompetentaj esperantistoj pri la lingvo. Multaj legantoj ne scias kiel apliki la bazajn regulojn...

Kompreneble, I.P.R. devas enhavi altkvalitajn fakajn artikolojn, speciale verkitaj por pedagogoj. Estas videble, ke multaj legantoj ne estas pretaj ankoraŭ por tia faka revuo. Tamen, tio ne estas kaŭzo por ke tia revuo ne ekzistu...

3. — 19 Feb. 57 (R.C., Francio)... Certe la kursoj « Lernu per Bildoj » kaj « Lernu kaj Instruu » estas interesaj. Mi ŝatus havi la bildojn je granda formato por la kurso. Sed mi pensas ke tiuj paĝoj ne utilis en revuo al kiu mankas loko.

Tiuj, kiuj abonis al « E. & C. », jam estas esperantistoj. Ĉu ili bezonas kurson? Tio nur favoras la « eternajn komencantojn ». Pli bone estas por la perfektigemuloj publikigi eltiraĵojn de klasikaj esperantistoj, kun, se eble, klarigoj, por inciti el legado... La revuo devas enhavi diskutojn pri ĝeneralaj pedagogiaj temoj (Ekz. « la antinomioj » de S-ro Cadenel), tradukojn de internaciaj pripedagogiaj artikoloj, komentojn pri libroj, precipe lernolibroj. Ĝi devas utili al la internaciaj rilatoj. Ĉu nacia Esperanto-revuo estas utila? Ne multe!

4. — 21 Feb. 57 (R.L., Francio). Ni nepre bezonas VERAN pedagogian revuon kiel antaŭmilite. Ĝi trafos, se ĝi baziĝos sur praktika metodiko (ĉar nur tiaj revuoj pli kaj pli disvastiĝas). Teorio estas liĉs rezulto.

5. — 22 Feb. 57 (C.B., Francio) ...Mi nur volas demandi, ĉu la kunesto de paĝoj por komencantoj kaj pedagogiaj artikoloj malutilas unu la alian? Ĉu la lernado estas malserioza laŭ eminentulo? Mi opinias ke la du partoj estas necesaj, la dua permesos, ke la komencantoj interesiĝu, iom post iom, pri la plej grava parto.

6. — 26 Feb. 57 (F.N., Jugoslavio) ...Mian opinion mi diris en la artikolo

« La Komence de I.P.R. » (vidu I.P.R., 1956, p. 118-119). Mi deziras, ke nia revuo atingu almenaŭ la nivelon de la kvar kajeroj de antaŭ preskaŭ 50 jaroj. Ĉu vere G.E.E.-anoj bezonas esti instruataj per bildoj? Ĉu ili krome bezonas kurson por komencantoj? Ĉu ili ne hontas, ke ilia revuo fariĝis gazeto por eternaj komencantoj?... Ni bezonas revuon egalnivelan al iu ajn nacia pedagogia revuo, aŭ eĉ pli altnivelan, ĉar ni laboras por ĉiuj nacioj. Ĉu G.E.E. ne havas ĉi tiun ambicion? Ĉu Francujo ne jam volas gvidi la kulturon de la Okcidento? Ĉu la francaj esperantistoj ne vidas sian mision en la mondo? Okcentanoj de G.E.E. estas granda armeo, kiu povus fari miraklojn!... Ni bezonas altnivelan I.P.R... la kursoj por eternaj komencantoj ridindigas nian revuon.

7. — 27 Feb. 57 (E.C., Hispanio) ...Pro kio, ni instruistoj devas subteni tri pedagogiajn revuojn? Pro kio, ekzisto de Instruista Letero, E. & C. kaj I.P.R.? Pro kio tri similaj kaj samtempe diversspecaj gazetoj aŭ informiloj por tutmondaj instruistoj? Jen la kialo: individuismoj, personismoj, naciismoj, unuvorte: stultismo, bagateloj. Ĉu ne konsentite ke unuigo estas forto? Estas do preferinda la kunfandiĝo de samspecaj aŭ analogaj idealoj kaj agadoj aŭ organizaĵoj... Mi proponas kunfandiĝon de pedagogiaj revuoj kaj verkado, cele havi eblecon disponi pri pli grava kaj interesa revuo, kiu allogos eĉ la ne-esperantistajn rondojn.

Por kio, lecionoj gramatikaj en fakaj revuoj? Ĉu ne estas fakto, ke ĉiuj landoj jam disponas pri sufiĉe da lernolibroj? Ankaŭ estas eldonitaj, dank'al Dio, porinfanaj libroj. Krom tio, distra paĝo enhavanta anekdotojn, spritaĵojn, ĉu lerneajn, ĉu eksterlerneajn, enigmojn, k.c., ĉiam estas kvazaŭ « salo kaj pipro ». Ankaŭ porinfana paĝo taŭgos.

8. — 5 Mar. 57 (N.H., Danlando) ...Mi deziras danki por la bona enhavo, precipe por instruistoj, kaj mi komprenas la dubon en la animo de S-ro Albault, ĉu li faru la enhavon ĉefe pedagogia aŭ ĉu li samtempe pensu pri la komencantoj. Mi proponas: du taŭgajn paĝojn por komencantoj.

9. — 5 Mar. 57 (T. K, Ĉeĥoslovakio). Ni ĉiuj — inklude la redaktoron — konscias ke la enhavo de nia I.P.R. ne estas ankoraŭ perfekta, ia eĉ ne kontentiga. Laŭ mia opinio I.P.R. devus esti pure pedagogia revuo. La antaŭmilite I.P.R. povus servi al ĝi kiel modelo tiel longe, ĝis la nuna I.P.R. superos ĝin. Laŭ mia opinio en faka revuo ne estas loko por skribaj kursoj servantaj al perfektigemaj komencantoj. En la nuna komenca stato mi tolerus la Distran Paĝon, sed pli poste mi ĝin forigus aŭ antaŭtaŭtigus ĝian enhavon per konhumoraj

rakontoj kaj anekdotoj en la lerneja vivo. Mi rekomendus aperigi en ĉiu numero dekon aŭ dudekon da fakaj pedagogiaj esprimoj, kiujn oni povus je la fino de la jaro kolektite apudmeti kiel du- aŭ kvar-folian aldonon de I.P.R. : vidu la fakvortaretojn de U.E.A. ! En la lasta numero estis tre interesa la artikoleto : « Ĉu infano povas esti denaske dulingva ? » kaj la artikolo : « La Antinomioj de la Edukado ». Mi konsentas la malnovan veron, ke la legantaro havas tian gazeton, kian ĝi meritas. Ni do pruvu, ke ni meritas perfektan fakan revuon ! Kaj mi ne dubas, ke ni HAVOS ĝin !

10. — 5 Mar. 57 (A.D.A., *Bulgario*)
 ...Trovu inter niaj samideanoj didaktistoj kunlaborantojn, kiuj prezentu en apartaj artikoloj koncize, sed sisteme, la principajn ideojn de la grandaj pedagogoj de la epoko de Komenski ĝis nun. Ekz. unu skribos pri la edukprincipoj de Jan Amos Komenski (Comenius) en lia verkaro, alia pri la principoj de Pestalozzi, iu rusa samideano pri la ideoj de Herbart, ktp... Se vi povos doni serion da tiaj artikoloj, la jarkolektoj de I.P.R. formos tre valoran vade-mecum por la pedagogoj.

Plue, se aliaj spertaj samideanoj pri-laboros kaj prezentos sisteme, en ordo, alian serion de artikoloj pri jenaj temoj : rolo de la instruanto en la edukado — laŭ la komprenoj de Komenski, de Pestalozzi, ktp., la rolo de la rekompencoj, de la punoj, la diversaj ĝis nun rekomenditaj metodoj por aktivigi la lernantojn, la principoj de la labor-edukado, respegulitaj en la verkoj de la nomitaj elstaraj pedagogoj, ktp. — certe el tio la gazeto gajnos ankoraŭ pli multe.

* *

Entute esprimis siajn opiniojn pri I.P.R., post S-no SCHULER, 14 legantoj el kiuj 7 francoj. Krome 3 francoj respondis pri E. & C. al S-no MICARD.

Ni konstatas ke la granda plimulto el la esprimitaj opinioj estas por revuo esklude dediĉita al pedagogio : el la dek supraj leteroj, ses preferas nur pedagogion, la 7-a opinias ke du paĝoj por komencantoj sufiĉus, la oka bedaŭre diras, ke ŝajne oni devas lasi parteton por komencantoj, la naŭa opinias, ke la du partoj gravas ; la deka, mem verkinto de kurso, ne precizigas sian opinion, sed donas taŭgajn ideojn por plivalorigi la revuon.

La afero estas klara : ekzistas plimulto eĉ nur en Francio por deziri plialtigon de la nivelo. Cetere, ni rigardu ĉirkaŭ ni. « Norda Prismo » estas nova altnivela revuo, kun nenio por komencantoj : ĝi nun transpaŝis la 3 000-an abonanton. Oni hezitos pagi 400 Fr. por

bulteno. Oni entuziasme abonos al interesa revuo, kiun oni krome povos fiere montri al eksterulo... Tio ne estas izola fakto. Oni ne hezitas elspezi kiam oni havas plezuron.

Kiujn decidojn ni povos alpreni por plialtigi la nivelon de IPR ? La Kongreso devos diskuti pri tio kaj tiel kontribuos al solvo. Mia opinio estas la jena. Unue ni devos agi singarde kaj iom post iom, sed firme kaj decidapaŝe. Koncerne la kurson de A.D. ATANASOV, ni devos ĝin aperigi tuta laŭ nia promeso : la tuta kurso (22 lecionoj) jam estas preta kaj en la redakcejo ; la komencantoj profitu kaj perfektigu ; du paĝoj estas rezervitaj. Post fino de tiu kurso povus aperi simplaj tekstoj, kun pedagogia intereso, laŭ studota formulo. La bildokurso, per si mem bonega, estas la plej atakita. Mi opinias ke ni devus en baldaŭ venonteco ĝin ĉesigi ; almenaŭ en IPR. Nenio malhelpus ke ĝi daŭre aperu en la franca parto kun francaj klarigoj eĉ. Tio eĉ estus bonvena : S-no MICARD plurfoje plendis ke li penas por plenigi la ok franclingvajn paĝojn (Vidu : E. & C., 1956, p. 72) Male IPR penas por aperigi siajn artikolojn. Sufiĉus kondensi la francajn tekstojn.

Por la distra paĝo, ĝi ŝajne devas resti ; sed eble oni devus studi ĉu alia formulo ne pli interesus : la interesitoj estas vere malmultaj laŭ la tamen premiita konkurso.

Resume, tiel estus du plujaj paĝoj por artikoloj. Restus por la komencantoj du paĝoj da kurso, krom la distra paĝo.

Oni sugestas, ke la artikoloj estu gajaj, bonhumoraj, sed ne tro dekatedraj ne tro profesorecaj. Mi konsentas, sed mi atendas tiaspacajn artikolojn. Aktiva pedagogio ? Volonte, sed ĉiuj skoloj rajtas esti prezentitaj en IPR : ĝi estu ne nur internacia sed ankaŭ interskola tribunalo. La skolo kiu havas la plej multajn kaj plej interesajn aŭtorojn, estos plej reprezentita : IPR estos kvazaŭ la barometro de la opinio de sia legantaro. Oni sugestas ke estu desegnoj : mi serĉas desegniston. Sed — por IPR — la du kontaktitaj sin rifuzis ĝin nun.


Certe kun iom da bonvolo, ĉiuj kune, ni povos krei revuon ne nur irdan je siaj du samnomaj antaŭuloj-kaj pri kiu ni ne timos honti antaŭ eksteruloj (kaj antaŭ ni mem !) sed ankaŭ revuon kiu kapablos venke lukti kun la naciaj kaj estos supera al ili, ĝuste pro sia vera internacieco. Krome certe ne estos difekto se ĝi prezentas en la plej moderna maniero kaj la plej lastajn atingojn de Pedagogio kaj la plej lertajn procedojn de la arto pedagoga. Tute male ! Al tiu kreado mi alvokas vin ĉiujn.

A. ALBAULT.

NI LERNU PER BILDOJ



VINTRAJ TAGOJ



1. la abio
2. la neĝo
3. la roko


4. la montoj
5. la vilaĝo
6. la preĝejo
7. la glacio

8. la vojo
9. la glitveturilo
10. la tegmento

1. Neĝas ! La neĝo falas sur la teron.
2. La tegmentoj estas kovritaj de neĝo.
3. La glitveturilo estas tirata de ĉevalo.
4. Kiam frostas estas glacio sur la akvo.
5. La abio estas pli alta ol la ĉevalo.
6. La abio estas pli alta al la ĉevalo.
7. Antaŭ la neĝofalo la ĉielo estis blua.
8. Post la neĝofalo la ĉielo estas denove blua.

DEMANDOJ :

Kiam neĝas ? — Neĝas dum la vintro.
 Kia estas la neĝo ? — La neĝo estas blanka.
 Kiel falas la neĝo sur la teron ? — Ĝi falas malrapide.
 Kiel la infano manĝas la bonan frukton ? — Li manĝas ĝin avide.



Kio falas ?
 Sur kion falas la neĝo ?
 Ĉu la ĉielo estas blua ?
 Kiel falas la neĝo ?



De kio estas kovrita la vilaĝo ?
 Ĉu la preĝejo estas pli alta ol la abio ?
 Kio kovras la vilaĝon ?
 Kiaj estas la vilaĝo kaj la abio ?



Kion faras la knabo ?
 Sur kio li glitas ?
 Kie estas la glacio ?
 Kiel glitas la knabo ?



Kion faras la knabo ?
 Sur kion li falas ?
 Apud kio li falas ?
 Ĉu la abio estas pli alta ol la montoj ?

A.D. Atanasov

LERNU KAJ INSTRUU



Sepa leciono

AL LA KURSEJO

Hodiaŭ je la 7-a horo, mi havas lecionon de Esperanto. Nun estas jam la 6-a kaj 50 minutoj. Al mi tute ne estus agrable veni malfrue al la kurso. Tial mi preskaŭ kuras tra la strato. La trotuaro svarmas pro homoj.

Subite — kies voĉon mi aŭdas voki mian nomon? Ho, la voĉo de Nikolao, mia bona amiko. Mi volus vidi lin kaj interŝangi kelkajn parolojn kun li, sed mi scias, ke, se li komencus paroli, nia interparolo ne ĉesos baldaŭ. Tial mi ne haltas. Sed jen ies mano kaptas min je la ŝultro de malantaŭe.

— Kien vi kuras tiel, diablo?

— Ho, Nikolao, saluton. Tamen — pardonu min nun. Mi devas rapidi, rapidegi...

— Tial do vi kuras kiel furioza ĉevalo! Depost kvin minutoj mi persekutas vin... Se vi estus birdo, vi ne povus flugi pli rapide. Kien do?

— En la gimnazio. Sed nun...

— Nu, bone. Mi akompanos vin iom. Kion vi povus serĉi vespere en la gimnazio?

— Tie estas vespera kurso de Esperanto. Mi vizitas ĝin. Mi timas, ke mi alvenos malfrue.

— Vi do lernas Esperanton? Ĉu vi havus ion kontraŭ, se mi akompanos vin en la kursejon? Kial vi lernas tiun lingvon?

— Por scii kaj uzi ĝin. Por ligi min kun homoj de ĉiuj nacioj. Sed tio estas pli vasta kaj profunda demando. Mi ne povus klarigi nun al vi ĉion...

— Ha, jen kontraŭ ni venas Marko...

Efektive nia komuna amiko Marko marŝas sur la trotuaro. Li rimarkas nin de malproksime. Li direktas sin al ni.

— Saluton! Kien? (Marko ordinare estas lakona en sia parolo).

Respondas Nikolao:

— Antono iras en la gimnazion al vespera kurso de Esperanto. Mi akompanas lin. Ĉu vi ankaŭ ne venus kun ni?

— Volonte, se oni permesus al ni ĉeesti.

Mi diris:

— Mi kredas, ke la instruisto konsentos pri via ĉeesto. Venu do! Vi mem konstatos senpere kiom facila lingvo estas Esperanto kaj kiajn sukcesojn mi atingis en daŭro nur de du monatoj...

Kaj nia triopo rapide marŝas al la kursejo.

Proverboj. — Volus la kato fiŝon manĝi, sed ĉi akvon ĝi timas.
Ne jeju ŝtonon en maldensan koton.

VERBO.

Kondiĉa modo: -US.

Ĉu vi deziras veni kun mi morgaŭ al la monto? — Mi volonte venus, sed por mia granda bedaŭro mi ne povos, ĉar morgaŭ mi ne estos libera. Se mi povus, mi venus.

PREPOZICIOJ.

Uzo de kombinitaj prepozicioj:

Mi prenas la kajeron el sub la benko. De la piedoj ĝis super la kapo. De sur la monto. De post. Vino de antaŭ dek jaroj.

AKUZATIVO.

Al en la ĉambro = en la ĉambrom.

Al sur la monto = sur la monton.

Kie vi estas ? — Mi estas en la lernejo.

Kien (al kie) vi iras ? — Mi iras en la lernejoN (al en la lernejo).

Supre estas alta arbo. Mi iros supren por vidi tiun arbon.

Antaŭ ĉiuj marŝas Petro. Li marŝas antaŭe. Iru antaŭen (al antaŭe), atingu Petron kaj antaŭiru lin !

Dekstre estas fenestro. Iru dekstren (al dekstre) kaj malfermu la fenestron.

En la supraj ekzemploj la akuzativo post prepozicio esprimas movon al loko kaj la punkton, kiun celas la movo : AL - direkto, EN - la loko, la punkto, al kiu celas la movo.

Memoru : post la prepozicioj AL kaj GIS oni neniam uzas akuzativon. (Car ili sufiĉe montras la almovon per si mem).

NOTINDAJ VORTUZOJ KAJ ESPRIMOJ.

JE — ĝenerala prepozicio sen difinita signifo, kiun oni uzas en kazoj, kiam neniu alia prepozicio esprimas taŭge kaj ĝuste la penson.

Ceesti = esti ĉe, esti en certa loka aŭ inter certaj homoj. Ceesti koncerton. Ceesti kunvenon. Via ĉeesto estos necesa.

Senpere = rekte (sen-per-e), sen io aŭ iu intermetita.

Mi aŭdas la voĉon de Petro voki min.

Ĉi tie la infinitivo rilatas al la komplemento kaj havas ĝian gramatikan personon.

Li invitis min viziti lian hejmon.

Mi konsilas vin aĉeti tiun ĉi libron.

Mi instigos lin paroli.

Diru al li rapidi.

Li vidis ŝin stari antaŭ la pordo.

EKZERCOJ.

1. Se mi pov..., mi vizit... vin.

Se ili labor... pli bone, ili ricev... pli grandan pagon por sia laboro.

Li ankaŭ pov... aĉeti pomojn, se li hav... monon.

Mi sent... min feliĉa, se mi hav... vian senzorgan karakteron.

Ne pensu plu pri la malbono, kiun li kaŭzis al vi ! — Ho, se mi pov... ne pensi pri tio !

2. Dimanĉe mi iros sur la mont... Mi esperas trovi ankaŭ vin sur la mont...

Venu ti... ĉi !

En ki... urb... veturos Marko ?

En ki... urb... loĝas via frato ?

Ili direktis sin supr... al la plej alta loko.

Lasu la libron sur la tabl... !

Ĉu vi iros en la teatr... ? Ĉu vi jam estis en la teatr... ?

Li metis la horloĝon en si... poŝ...

3. Ĉu vi aŭdis lin kant... ?

Al mi estas agrable vidi ...

manĝi ...

veturi al ...

ricevi ...

Ni surprizis ilin prepar... siajn valizojn por forveturo.

2-a Internacia Sportkonkurso de Esperantistaj Lernejoj

Mi vokas ĉiujn lernejojn, kie estas esperantistoj partopreni en la internacia malpezatletika konkurso por geknaboj, kiun mi organizas, kiel pasintjare okaze de la *Internacia Tago de Infanoj* (ITI, 1 Jun 57).

La celo de la konkurso estas :

1) Solene kaj internacie festi la ITI, t.e. helpi al interfratiĝo de partoprenantaj nacioj, helpi al plifirmigo de la mondopaco.

2) Helpi al disvastigo de Esperanto en la tuta mondo, sed precipe en tiuj lernejoj, kien ni nun intencas enpenetri.

3) Trovi novan vojon por internacia sportkonkursado de la junularo.

Kiu estas la historio de ĉi tiu sportkonkursado ?

La 1-an de Junio 1956 mi organizis ĝin unuafoje. Partoprenis ĝin 10 lernejoj el Anglujo, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokrata Respubliko, Hungarujo (2) kaj Vietnamo (5) kaj 120 gelernantoj : 46 knabinoj kaj 74 knaboj en la aĝo de 13-14 jaroj. La plej bona skipo (*) de knabinoj estis el Pestalozzischule en Freital, G. D.R. La plej bona skipo knaba estis el Temple Boys School, en Rochester, Anglujo. La plej bona knabo estis Werner Dressler kaj la plej bona knabino Gabriela Lehmann, ambaŭ el Freital.

REGULARO DE LA KONKURSO :

1) DIFINO DE LA KONKURSO : La sportkonkurso enhavas tri elementojn : kuro 60-metra, longosalto, ĵeto de bulo 4-kilogramo (knaboj) kaj 3-kilogramo (knabinoj). Ĉiu lernejo vetbatalos sur propra sportejo. La tutan matĉon (**) organizu instruistoj aŭ gimnastikprofesoroj.

2) SPORTKONKURSAJ KONDIĈOJ : Oni vetbatalas laŭ jenaj malpezatletikaj reguloj :

a) *Kuro 60-metra* : tempon oni mezuras per sporthorloĝoj (10- aŭ 30-sekundaĵ) precize je dekonono de sekundo (ekz. : 9,1 s.). La sportejo kie oni kuros distancon 60-metran estu ebena. Se estos vento oni kuros kontraŭ ĝi.

b) *Longosalto* : la saltolongon oni per sportmetraro mezuros ortangule de la saltotabulo ĝis la unua plej proksima spuro, kiun faris kiu ajn korpoparto. Oni

mezuros precize je centimetroj (ekz. 412 cm.). Oni saltos trifoje kaj la plej longan salton oni kalkulos por la vetbatalo. Se la saltanto transpaŝis la saltotabulon, oni ne mezuros tiun salton, sed oni kalkulos ĝin kiel faritan.

c) *Ĵeto de bulo* : la pezo de la bulo por knaboj estas 4-kilogramo kaj por knabinoj 3-kilogramo. Oni ĵetas el cirklo, kies diametro estas 2,135 metroj. La longon de la ĵeto oni mezuras per sportmetraro ortangule de la ĵettabulo ĝis la plej proksima spuro, kiun faris la bulo. Oni ĵetas trifoje kaj la plej longan ĵeton oni kalkulos por la vetbatalo. Se la ĵetanto transpaŝos la ĵettabulon oni ne mezuros la ĵeton, sed oni kalkulos ĝin kiel faritan. Oni mezuros precize je metroj kaj centimetroj (ekz. 6,79 m.).


3) REPRESENTANTOJ :

Ĉiun lernejon reprezentos kiu ajn nombro de knaboj aŭ knabinoj naskiĝintaj en 1943-1944. Ĉiu el ili kuros, saltos kaj ĵetos. Iliaj plej bonaj rezultoj en kuro, salto kaj ĵeto estas poentataj laŭ viaj propraj reguloj. Laŭ tiuj poentoj estos starigita la vico en la skipo de ĉiu lernejo : knaboj kaj knabinoj aparte. Por la fina rezulto de la konkurso sendu al mi la rezultojn de viaj kvar plej bonaj knaboj kaj kvar plej bonaj knabinoj. Mi mem poentos ilin laŭ la ĉeĥoslovakaj reguloj. La rezultojn mi diskonigos. Oni vetbatalas pri la plej bonaj skipoj : knaba kaj knabina, ankaŭ pri la plej bonaj knabo kaj knabino. Lernejo povas aliĝigi skipon de knaboj aŭ de knabinoj aŭ ankaŭ ambaŭ skipojn.

4) ALIĜILOJ : Se via lernejo intencas partopreni ĉi tiun konkurson, tuj sendu simplan poŝtkarton registritan per aerpoŝto al mia adreso. Sendu ĝin *vere tuj*, ĉar mi volas anonci ĉi tiun internacian sportkonkurson en ĉeĥoslovakaj gazetaroj kaj radio-stacioj. Sciigu la oficialan nomon de via lernejo kun preciza adreso. Ne forgesu diri, ĉu vi aliĝiĝas skipon de knaboj aŭ de knabinoj aŭ ambaŭ skipojn.

5) EFEKTIVIGO DE LA MATĈO : ĉi tiun matĉon efektivigu la 1-an de Junio 1957, dum la ITI. Mi petas vin sendi al mi tuj post la fino la rezultojn de via skipo. Skribu la nomojn de ĉiuj vetbatalantoj, ilian naskiĝjaron kaj sekson kaj la atingitajn rezultojn por ke mi povu kiel eble plej frue starigi suman rezulton de 'a

(fino sur paĝo 58).



Unuope ricevitaj verkoj estas menciataj, duope - recenzataj. Ĉiu recenzanto liberas en siaj diroj, pri kiuj la Redaktejo ne respondecas.

Tri verkoj de Volter (Voltaire) : *Kandid, Zadig, Senartifikulo en la traduko de E. LANTI, S.A.T., Paris 1956. 312 paĝoj 12 x 18. Prezo : 2,30 dol. aŭ ekvivalento.*

Jen grava verko en la traduka literaturo Esperanta, grava pro la famo de la originala aŭtoro, grava pro la uzo kiel propagandilo por iuj ideoj en fakaj ronloj. Kiel Franco, mi multe ŝatas la stilon de Volter, kaj dum jaroj, mi multe admiris lian agadon favore al la libera penso. Pro tio mi devintus (estus devinta) ĝui grandan plezuron okaze de tiu legado, bedaŭrinde mi grave seniluziigis. Unue, mi ne gustumis kiel antaŭ dudek jaroj la ideojn de Volter, kaj due mi stumblis plurfoje legante la esperantan tradukon. Jen resume mian impreson, kiun mi pravigos per jenaj argumentoj.

La ideoj de Volter estis, en la 18-a jarcento, sufiĉe kontraŭsociaj kaj precipe kontraŭekleziaj, por aspekti revoluciaj. Nun, ili aperas kadukaj kaj eksmodaj. Lanti, en ia antaŭparolo, sin demandas ĉu Volter estas ateisto aŭ deisto; por mi, laŭ tiuj tri verkoj, li estas deisto. Sed tiuj du vortoj ne klarigas tutan filozofion. La tradukinto ankaŭ skribis ke tiuj fabeloj estas preferindaj al verkoj pezaj, enuigaj. Laŭ iu plezura vidpunkto, jes, sed laŭ valoro de la ideoj, konvinka forto de la argumentoj, eble ne.

En « *Kandid* », la aventuroj estas tute artefaritaj, la herooj senĉese falas en novajn kaptilojn. Sur la ŝultrojn de *Kandid*, Volter elverŝis ĉiujn maljustaĵojn de la mondo, estas tro por konvinki. Kiu deziras tro pruvi, tiu pruvas nenion.

En « *Zadig* », estas sama afero, inter 64 kandidatoj, unu, nek nulo nek du, estas honesta, el 100 virinoj, unu, nek nulo nek du, estas fileda... Oni ne povas, eĉ ŝajne, kredi tiajn rakontojn, kaj la demonstra valoro estas malpli granda.

Cetere, la pozitiva filozofio de Volter, tio estas la parto kiu ne riproĉas al la sociaj moroj tiamaj, estas iom infana. Sufiĉus, diras Volter, aŭskulti racion kaj laŭdi al la kreinto. Li ne sukcesas nei optimismon, ĉar providenco ĉiam helpas liajn heroojn, kaj en la ĉapitro de « *Zadig* » kie temas pri destino, la ermito-destino rezonas kiel faras Panglos, pravigante ĉion kio okazas.

Rilate al la esperanta lingvo, mi notis kio ŝokis min, kaj ĉapitro post ĉapitro, mi komparis kun la originala franca teksto. Laŭ pure estetika vidpunkto, mi devas konfesi ke dum mi legis ĝoje la francan tekston, mi ofte penis legi la es-

perantan (mi legis unue la esperantan). Tio evidente pruvas nenion, ĉar verŝajne, mi pli bone konas la francan lingvon. Tial mi zorge notis, ne ĉiujn erarojn, sed la plej tipajn, kaj per tiuj notoj, mi povas pravigi mian impreson. La tradukinto deziris uzi simplan stilon, pro tio, tro ofte « is » aŭ « us » formoj anstataŭas malsimplajn tempojn. Tia stilo al mi ne estas klara, precipe kiam temas pri traduko de teksto kies originala aŭtoro pensis per pluraj pasintaj tempoj. Due, la tradukinto provis sekvi intime la tekston, mi kredas ke el tiu zorgo fontas francismoj, malagrablaj al miaj oreloj, kaj eble ne facile kompreneblaj de fremduloj al franca lingvo. Estis ankaŭ eraroj pri kelkaj vortoj, frazoj malbone konstruitaj, kaj eĉ ne fidelaj tradukaĵoj. Vere, tio ne estas tre grava, sed tamen, kiam oni legis multajn laŭdojn pri la talento de la tradukinto, oni estas iom seniluziigita. Krom tio, devas esti preseraroj sufiĉe nombraj, kaj la plej grava estas manko de 29 linioj de la franca teksto (la cetero estas ne komprenebla).

Pro tiuj diversaj kialoj, mi opinias ke tiu libro ne estas tiel perfekta kiel oni verŝajne presos sur la reklamiloj.

F. BOYET.

VAGADO SUB PALMOJ

Originale verkita de Jean RIBILLARD. Antaŭparolo de Reto ROSSETTI. Eldonita de UEA, 1956. 56 p., 13,5 x 21,5, 20 fotoj. Prezo 2,50 ned. gld., aŭ 10 steloj.

La aŭtoro, oficiro de la Afrika Armeo, transportas nin kun si tra kelkaj oazoj de Saharo kaj kvazaŭ ne tuŝante ilin, priskribas kelkajn aspektojn el la tiea vivo okaze de rakonto pri vojaĝo, ekskurso aŭ kontakto kun la indigenoj.

Bonhumora, kelkfoje eĉ humura, ĉiam freŝa, la rakonto ĉiam agrable disvolviĝas. Skribita en tre bona lingvo spicita de sukoplenaj komparoj kaj de du-tri esperantistaj aludoj, ĝi vin katenas al tiu miraĝa lando; vi komencos la libron, vi ĝin finos kaj diros: ĉu jam?

Se vi dziras iom malstreĉiĝi kaj iom ekscii pri fora, sunbrulita lando, jen la libro por vi.

Ne multaj preseraroj. Tamen, malsupre de p. 13 *serĉas* devas esti *ŝercas*; meze de p. 47 legu *anhelanta* (ne: *helanta*). Fine malsupre de p. 49 en: *kvazaŭ se mi volapŭke predikus*, la vorteto *se* estas pleonasma.

Entute rekomendinda libreto. A. A.

(fino de la recenzoj sur p. 59).

Prof. Andreo Gauder

La Instruada afero de la naciaj minoritatoj en Hungario

Samideano Andreo GAUDER naskiĝis en 1909 en Hungario. La finis la gimnazion en Szeged, kiel eminenta lernanto. Li studadis je diversaj eksterlandaj universitatoj po unu semestro (Lausanne en Svisujo, Heidelberg, Leipzig kaj Marburg an der Lahn en Germanujo, Besançon kaj Sorbono en Francio, Romo en Italujo), iĝis mezlerneja profesoro en 1933 (jako : germana kaj franca lingvoj, poste li akiris diplomon el itala, rusa lingvoj kaj Esperanto, parolas, krom la menciitajn lingvojn angle, hungare kaj legas hispane). Samideano GAUDER finstudis juron funkciis en diversaj gimnazioj ; nuntempe li loĝas en Győr (mezvoje inter Budapeŝto kaj Vieno), organizis la landan Esperanto-Kongreson en Győr en 1948. Lia edzino estas same lingvoprofesorino, ili havas filon 10- kaj filinon 8-jaraĝan. S-no GAUDER skribis pli ol 120 sciencajn artikolojn en la plej diversaj lingvoj kaj revuoj. Tereno de lia interesiĝo estas lingvistiko, historio de literaturo, kulturpolitiko, internacia korespondado de lernantoj. Nia movado povas fieri pri tia eminentulo. Ni esperu ke li povos plu verki por IPR. — Red.

Dum la pasintaj dek jaroj la instruada afero de la naciaj minoritatoj en Hungario ege evoluigis. Nuntempe 328 instruadaj institucioj helpas la kulturan evoluon de la nacia malplimulta loĝantaro. La sekvaj institucioj okupiĝas pri la instruado kaj edukado : 49 infanvartejoj, 38 ĝeneralaj lernejoj ; en 275 lernejoj la gelernantoj povas lerni sian propran gepatran lingvon, kiel specialan lernobjekton, 7 hejmoj por lernantoj de ĝenerala lernejo, 3 ĝeneralaj gimnazioj, 3 instruistaj seminarioj, 4 hejmoj por lernantoj de mezlernejo kaj 3 altlernejaj katedroj.

La registaro senĉese prizorgas la lernolibrojn. Oni preparas specialan programon por la naciaj lernejoj. La popolpoezio, popolarto kaj vivo de la naciaj malplimultoj estos demonstrataj en la lernolibroj. Dum 10 jaroj oni eldonis 194 lernolibrojn. El inter la nuntempe uzitaj libroj 88 estas jugoslavaj, 3 germanaj, 43 rumanaj kaj 42 slovakaj.

Post la mondmilito mankis pedagogoj en la lernejoj de la naciaj minoritatoj. Pro tio la instruada ministerio organizis la edukadon de la instruistoj kaj profesoroj. La jugoslava, rumana kaj slovakaj instruistaj seminarioj kaj la pedagogiaj altlernejoj jam kontentigas la bezonon pri pedagogoj.

La instruada registaro pluen evoluigas la lernejojn. Antaŭ ĉio ĝi plikreskigas la nombron de la infanvartejoj. Precipe la germanlingvaj ĝeneralaj kaj mezaj lernejoj estos evoluigitaj. En la instruaro 1956-57 oni malfermas germanlingvan gimnazion kaj instruistan seminarion kun studenthejmo. Je pedagogia alternejo oni organizas germanlingvan katedron.

La pedagogoj de la naciaj malplimultoj ĝuas la saman moralan kaj materia lan estimon kiel la hungaraj pedagogoj. El inter la pedagogoj de la naciaj minoritatoj kelkaj ricevis premiojn, distin-

gojn. Johano Filyo, en Ormenyhut, ricevis la ordenon « Ruĝa Flago ».

La nuntempa situacio kaj evoluo de la instruado fidele respegulas la kompletan egalrajton de la naciaj malplimultoj.

Fino de la paĝo 56.

sportkonkurso. La plej malfruaj rezultoj alvenu la 30-an de Junio 1957.

Mi petas vin samtempe sendi priskribon de la efektiviĝo de la matĉo sur via sportejo (ĉu partoprenis direktoro ktp.). Sendu foton de via skipo.

Mi esperas ke via lernejo partoprenos tiun sportkonkurson kaj ke ni ĉiuj vere internacie festos la Internacian Tagon de Infanoj, la tagon de la mondopaco, interfratiĝo kaj interkompreno.

Per Esperanto por la mondopaco ! Vivu, vivu la paco en la tuta mondo !

Oldrich SCHWETTER,
instruisto pri gimnastiko
Havirov I. - blok 14/67
Ĉeĥoslovakio.

GLOSOJ :

* *Skipo* : grupo de homoj kolektive agantaj por difinita celo : nokta skipo en uzino, skipestro ; futbal-skipo ; redakta skipo. (La kelkfoje uzata vorto teamo estas netaŭga pro sia formo : te-amo (!), kaj akcesore stranga rilate sian etimologion : la angla team prononcenda ti:m).

** *Matĉo* . Angle kaj france : match. — P.V. indikas la formon *maĉo*. Sed *maĉo* estas la ago maĉi, dispremi per la dentoj. — La prononco estas klara, se oni atentigas la silabigon : ma-ĉo kaj mat-ĉo. Krome, estas elemente scii ke ĉ nek plene, nek vere egalvaloras tŝ.

INFORMOJ

« GRAJNOJ EN VENTO »

Sinjorino B.M. Delgado, instruistino en infangardeno, Anglujo, akceptas la taskon gvidi novan rondon interlernejan : la rondo de la plej junaj inter la Esperantistoj. Partoprenantoj estos knabetoj kaj knabinoj 4-jaraj ĝis 8-jaraj !

Instruistinoj en infangardenoj kaj unuaj klasoj de popollernejoj, gepatroj, grupoj kaj kluboj, interesigu pri tiu ĉi nova, unika, valorega rondo ; Ne necesas, ke la infanoj jam scias legi, ĉar la verkoj de la infanetoj estos precipe desegnaĵoj, konstruaĵoj el papero, ktp. Ili estos eldonataj je 20 ekzempleroj en formo de kajero 21 × 29,7 centimetroj, tri-foje dum la jaro.

Tuj skribu al la rondestrino : S-ino B. M. Delgado, 21, West Street, Kettlebrook, Tamworth, Staffs, Anglujo.

La Centra Oficejo de « GEV » : Marcel Erbetta, rue des Pins, 66, Bienne 7, Svislando.

EL LA GAZETOJ

« Narodni List » (Nacia Gazeto) en Zagrebo de la 10 Mar 57 publikigis longan artikolon pri la kvara numero de « Grajnoj en Vento », « gazeto diferenca de ĉiuj aliaj gazetoj, kiuj ekzistas ; gazeto pli modesta kaj pli riĉa ol ĉiuj ». La verkinto, Marija Grgičević emfazas la edukan valoron de tiu interlerneja gazeto por la infanoj de la tuta mondo. La artikolo, kun subtitolo en Esperanto estas ilustrita per du fotografioj de la klaso en Zagrebo, kiu ĵus ricevis la volumon.

POLA AGADO

De oktobro de pasinta jaro, daŭris en Gdansk (Polujo) kurso de Esperanto, aranĝita por instruistoj, de turisma sekcio ĉe loka filio de Instruista Sindikato. Kurson partoprenis 54 personoj, sed bedaŭrinde finis nur 22. Post kursofino, «skursanoj», ĉe loka filio de Asocio de Esperantistoj en Pollando fondis *Instruistatan Sekcion*. Fondkunveno okazis la 13-an de marto. Oni elektis jenan estraron : prezidanto prof. Teczyski Jozefo ; sekretario, prof. Pirog Johanino ; kasiso, prof. Pacula Tadeo.

Sekcio havas kunvenojn ĉiu-dusemajne. Adreso : Asocio de Esperantistoj en Pollando-Filio en Gdansk. Instruista Sekcio. *Gdansk* str. Garncarska Nro 18.

Dum la kuranta lerneja jaro (1956-57) en nia marborda tri-urbo, estis Esperanto instruata en jenaj lernejoj :

Technikum Przemyslu Okretowego (Metiista Mezlernejo de Sipindustrio) en Gdansk — Str. Bialawieska Nro 1 — kie lernantoj lernas en du grupoj, entute 30 knaboj en aĝo de 16-19 jaroj ;

Liceum Technik Plastycznych (Liceo de Belaj Artoj) en Gdynia-Orlowe, str. Obr. Stalingradu 39. kie lernas Esperanton geknaboj en aĝo de 16-20 jaroj, en du grupoj en normala lerneja horaro : unu

grupo 18 geknaboj, dua grupo tuta klaso-30 geknaboj ;

Technikum Budownictwa przemysłowego (Metiista Mezlernejo de Industri-konstruado) Gdansk-Wrzeszez str. Szopena, unu grupo de 14 gelernantoj en aĝo de 16-19 jaroj ;

Liceum Ogólnokształcące-Pruszer apud Gdansk-grupo de 30 gelernantoj en aĝo de 14 ĝis 17 jaroj.

ABELBREDADO

Esperantista direktoro de lernejo por abelbredistoj invitas vin viziti franclingvajn kursojn de la 15-a ĝis 31-a de julio 1957. Por ĉiuj informoj turnu vin al la direktoro : S-ro Calvas, 59, faubourg du Soleil, Alès, Gard, Francio.

ANONCETO

Dezirias korespondi kun emerita esperantisto. Janih Regina, emerita instruistino, *Banja Luka*, Ruzveltora 7, Jugoslavio.

Fino de la paĝo 57.

POEZIAĴOJ : VERSAĴOJ PROPRAJ KAJ TRADUKITAJ de Julian Tuwim. *Eldonejo « Polonia »*, Varsovio 1956. 130 p. 14,5 × 21,5 kun portreto de la aŭtoro kaj arta surkovrilo. Enkonduko de Artur Miedzyrzecki.

Jen kolekto kiu prezentas al ni unu el la grandaj polaj poetoj el la nuntempo : Julian Tuwim, 1894-1953.

En unua parto kuŝas iom pli ol tridek liaj poemoj elektitaj el liaj diversaj verkoj. Ilin tradukis esperanten diversaj polaj samideanoj inter kiuj mi notis Leo BELMONT, kies nomo kuŝas jam en la Fundamenta Krestomatio kaj Isaj DRATWER konata nuntempa pola eminenta esperantisto. Tiuj tradukoj parte aperis en diversaj revuoj inter kiuj « Literatura Mondo ».

En dua parto estas tradukoj de Julian Tuwim mem verkitaj de 1911 al 1914 : li esperantistigis en 1910 sed oni miras trovi nenian esperantan originalaĵon de li.

Ne egalvaloras tiuj tradukoj. Ĝenerale ili estas agrable legeblaj sed en kelkaj lokoj estas malfortaj, fojfoje eĉ neklaraj. Sed tio ne malhelpas ĝui la tuton de la verko kaj konatigi kun la granda pola poeto, kiu montriĝas kiel sentema kaj impresema lirikisto ofte malgaja kaj rezignema. Li ankaŭ scias tre elvokive pentri per kelkaj vortoj : Ekzemple en « Gemaljunuloj » tri strofoj duversaj sufiĉas por bildigi la sencelecon kaj izolecon de la maljunuloj.

Jen do plia libro de la eldonejo « Polonia » kiu sin distingas jam per belaj Esperanto-eldonaĵoj. Gratulu la eldonejon per mendoj ! (Ankaŭ tra la libroservo de GEE — adreso de nia administranto — : vi tiel helpos al poloj, krome aboniantan revuon !).

A. A.

Distra Paĝo

KONKURSO n° 5

Gajnintoj : S-ro A. Caubel, F-ino R. Caubel, F-ino Chatelain, F-ino Deygas, S-ino Pallard, F-ino Texier gajnis 2 poentojn.

D-ro Jaromir Jermar gajnis 1 poenton.

Post tiu konkurso, F-ino Deygas kaj S-ino Pallard gajnis 300-frankan libron.

Ni gratulas ĉiujn.

KONKURSO N° 6

Solvo : Horizontale : 1. Turistloko ; 2. Eliras ; 3. JN, Onif, Bo ; 4. Piv, Ol, Aer ; 5. Itov, Oblat ; 6. Sojlo, Vetu ; 7. Tno, KL, Nan ; 8. Io, ksak, Je ; Glikoz ; 10. Oferdonaco.

Vertikale : 1. Tajpistino ; 2. Nitono ; 3. RE, Vojo, Ge ; 4. Ilo, VL, KLR ; 5. Sino, Oksid ; 6. Trilo, Lako ; 7. Laf, BV, Kon ; 8. Os, Alen, Za ; 9. Beataj ; 10. Oportuneco.

Gajnintoj : F-ino Arnoult, S-ro Bourry, S-ro A. Caubel, F-ino R. Caubel, F-ino Deygas, D-ro Jaromir Jermar, Ges-roj Lanz, S-ino Le Goff, S-ino Lemoine, Ges-roj Lenel, S-ino Robin, S-ino Gudula Thénée, S-ro Trepier gajnis 2 poentojn.

S-ro Fischer gajnis 1 poenton.

Post tiu konkurso Ges-roj Lanz kaj F-ino Arnould gajnis 330-frankan libron.

Korajn gratulojn.

KONKURSO n° 8

Horizontale :

1. Muzika verko.
2. Kudrornamas.
3. Konduti iel kontraŭ iu (r) ; nekompleta sameco de sentoj inter pluraj personoj ; dependiga konjunkcio.
4. Paperujo ; prepozicio ; prepozicio.
5. Malplezura pro senintereso ; rilata al okulo.
6. Senmovebligi pordon ; inverse : aldirekto.
7. Inverse : mola hararo (r) ; pronomo ; diri per laŭta akra voĉo (r).
8. Inverse : adverbo ; kerna esenco ; duonŝirmejo.
9. Ilo por restigi ion en iu loko.
10. Libro de la Nova Testamento pri la fino de la Mondo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2		■								■
3			■						■	
4				■				■		
5					■					
6						■				
7			■				■			
8		■						■		
9	■									■
10										

Vertikale :

1. Apartenanta al la kvara geologia epoko.
2. Havantaj genion.
3. Inverse : prefikso ; malgranda peco de malmola metalo, kiun oni eljetas per ĉiaj porteblaj pafiloj (r) ; kapo de toro.
4. Kapo de fabela besto ; prepozicio ; enhavanta neniom akvon (r).
5. Speciala al iu loko ; ne respondeca.
6. Statuo de diaĵo ; inverse : tralasi likvaĵon.
7. Malhelpi (r) ; inverse : numeralo ; inverse : aparato.
8. Inverse : dependiga konjunkcio ; longforma rekta kavaĵo (r) ; sufikso.
9. Manĝilo.
10. Paciento.

Bonvolu sendi viajn solvojn ĝis la 25-a de la venonta monato al S-ro Guillot, Cours de la 4^e République, Gaillard (Hte-Savoie), Francujo.

Anoncetoj

La kvara klaso de la okjara lernejo (11-jaraj gelnantoj) deziras korespondi kun gelnantoj en aliaj landoj. Skribu al : 4. razred osmogodiŝnja škola, Novi-grad Podravski, Jugoslavio.

PERANTOJ DE I. P. R.

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, Holland Park Avenue, London, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : *Bulgara Esperantista Asocio*, Sofia, Bul. Stalin n° 40.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », Ingemannsvej 9, *Aabyhof*. (Cek-konto :16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : Helmut ROSSLER, 22 b, *Hechtsheim bei Mainz*, Friedensstr. 15. Cek-konto : 43 357 Ludwigshafen/Rhein.

Jarabono : 4.8 germanaj markoj.

HISPANA : E. CALVET, Pl. Gral Sanjurjo, 7, *Tarragona*. (Konto n° 956-293 ĉe « Banco Espanol de Credito »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : Eduardo ZUMBO, *Casella postale* 226, *Torino*.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : Josip VAJDLIH, Podolje 15, *Zagreb*. (Cekkonto : Gradska ŝtedionica Zagreb, 40-KB-6 n° 4653.

Jarabono : 330 dinaroj.

NORVEGA : Erling HOLTEN, *Leangen i Strinda*.

Jarabono : 8.50 kronoj.

NEDERLANDA : S-ro VERBRUGGEN, Oosterhesselenstraat 560, *Den Haag*.

SOVET-UNIA : Roberto DVORKIN, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, *Leningrad*, 22, Kirovskij 42.

SUOMA : Joel VILKKI, *Somero*, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », Box 19071, *Stockholm* (Poŝtĉeka Konto : 578).


Jarabono : 6 kronoj.

USONA : Jarvis E. BUSH, 3700 North 75-th Street, *Milwaukee* 16, Wisconsin.

*
**

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : E. BIDOIT, 6 rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.) Francio. (Poŝtĉeka konto : 143-867 *Nantes*). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Ni daŭre serĉas perantojn.



La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio
Tél. 34

FRANCA KULTURDOMO

Restadoj dum somero 1957

La Kastelo Grésillon estos malfermita de la 1-a de Junio ĝis la 14-a de Septembro 1957.

1-a Periodo : 1-an de Junio — 14-an de Julio

Kursoj de Esperanto por komencantoj — Instruado de amatora bindarto
Turismaj karavanoj

2-a Periodo : 14-an de Julio — 24-an de Julio

Sensacia Manifestacio :

Kulturaj Internaciaj Ferioj

Kun Profesoroj AULD, LAPENNA, WARINGHIEN,
Dro ALBAULT kaj Ing. WATIER

3-a Periodo : 25-an de Julio — 10-an de Aŭgusto

La Franca Lingvo

por alilandaj samideanoj

Eksterordinare bona metodo por instrui rapide la francan lingvon pere de Esperanto, kursoj por komencantoj kaj por perefktigemuloj. Necesas uzi sufiĉe bone Esperanton.

4-a Periodo : 10-an de Aŭgusto — 31-an de Aŭgusto

Somera Lernejo - Tri kursoj de Esperanto

5-a Periodo : 1-an de Septembro — 14-an de Septembro

Fakaj Renkontiĝoj - Liberaj Ferioj